

## **RIĈA AKTIVADO ANTAŬVIDITA EN APRILO**

Pluraj interesaj aktivadoj estas antaŭvidataj por tiu ĉi monato aprilo. Pretigu vian agendon, ĉar ni havos ŝancojn por ĉies gustoj.

La unuasabata renkontiĝo okazos la 7an de aprilo, ekde la 18:00 horo en la sama loko de la pasinta monato: kafejo de la kulturcentro Medialab Prado, strato Alameda 15, proksime al Paseo del Prado, apud Caixa Fórum.

La 11an de aprilo, profitante la ĉeeston en Madrido de nia amiko Kani (José M<sup>a</sup> Salguero, el Don Benito), post sia reveno el la Mezorianta Kunveno en Marakeŝo, li prelegos pri “Juan Goytisolo, transkultureco transĝibraltara” (pri kiu li prelegos ankaŭ en tiu kunveno), kaj rakontos pri tiu esperantista evento. La evento okazos je la 7a vespere en la sidejo.

La 17an de aprilo, mardon, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegos en la hispana pri “Esperanto kaj esperantistoj dum la hispana interna milito”, invitita de la asocio GEFREMA (*Grupo de Estudios del Frente de Madrid*). La evento okazos en la salono de la Biblioteko Iván de Vargas, en la strato Sacramento, je la 19:00 h.

La vendredon, 20an de aprilo, Madrida Esperanto-Liceo partoprenos en la “Nokto de la Libroj”. Nia kontribuo al tiu tutmadrida evento, anoncita en la oficiala programo pretigita de la regiona registaro, estos la prezentado de la 2-a eldono de la libro “Miguel Hernández, poeto de l’ popolo”. Temos pri la unua prezentado en Madrido al neesperantista publiko, post la oficiala prezento en Alikanto dum la kongreso dediĉita al la poeto en novembro pasintjare. La evento estos ŝanco montri nian sidejon kaj nian aktivadon al la ĝenerala publiko, samtempe informante pri nia lingvo kaj ĝia kulturo kaj literaturo. Pri la prezento zorgos la tradukinto, Miguel Fernández. Vidu programon en: <http://www.nochedeloslibros.com>.

Plia aktivado, jam tradicia, en tiu celebrado de la libro, estos la partopreno en la sinsekva kompleta legado de la verko Don Quijote de La Mancha, en la *Círculo de Bellas Artes*. Ni denove kunlaboros legante du pecojn en Esperanto, kaj ni rezervis por tio vicon la mardon, 24-an de aprilo, je la 16,30 horoj. Ni kiel kutime kunvenos kvaronhoron antaŭe en la halo de la Círculo, por kune ĉeesti la eventon, kaj klarigi la proceduron; se iu el niaj legantoj deziras legi, rezervu vian vicon skribante al nia redakcio aŭ al la adreso de MEL; ni bezonas du homojn, kaj ni prioritatigos tiujn kiuj ĝis nun neniam partoprenis en la publika legado, sed ankaŭ homoj jam legintaj povas skribi. Venu krome eĉ se vi ne deziras legi kaj nur ĉeesti.

Fine, memoru ke ni kunvenas ĉiujn lundojn, post la 18,30 en la sidejo. Atentu tamen ke la 2-an de aprilo (pro ferioj) kaj la 30-an (pro la ponto) ni ne certigas ĉeeston, kaj do ni sugestas ke vi voku antaŭe por konfirmi.

Notu do ĉiujn datojn, kaj profitu por partopreni la riĉan eventaron en Madrido dum aprilo.

## **“TAGOJ KAJ RUINOJ” EN BLANQUERNA**

Kiel ni anoncis en la pasinta numero de la bulteno, la 12an de marto okazis prezentado de la libro “Tagoj kaj ruinoj” en la kulturcentro kaj librejo Blanquerna, apartenanta al la delegacio de la registaro de Katalunio en Madrido.

Post enkonduko fare de la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, J.A. del Barrio,



la eldonisto de la verko Pedro Sanz, nome de SAT-en-Hispanio, kaj ĝia tradukinto Miguel Fernández, prezentis la verkon, la aŭtoron Jaume Grau Casas kaj ties signifon por la kataluna kulturo, la malfacilajn cirkonstancojn de verkado kaj la procezon de eldonado de la libro en la esperanta versio.

La prezenton ĉeestis trideko da homoj, plej multe esperantistoj kaj amikoj. Ĝi estis filmita de Blanquerna kaj publikigita en ties kanalo de Jutubo, kaj en tiu de HEF.

### **VIZITO AL FRAMASONA LOĜIO**

La 19an de marto grupo de esperantistoj kaj amikoj vizitis la madridan framasonan “regulan” loĝion. Oni montris al ni la instalaĵojn, kaj oni eksplikis la historion, celojn kaj kutimojn de tiu fluo de la framasonaro. Ni ne povis disanonci la viziton pro peto de la organizantoj rilate al grandeco de la grupo, sed ni planas alian eventon por junio, en la alia fluo de la framasonaro, la “liberala”, pri kiu ni diskonigos detalojn kiam ili pretos.



### **KONGRESOJ EN MADRIDO**

La 31an de marto finiĝas la unua aliĝperiodo de la kongresoj okazantaj en Madrido en julio 2018, t.e. 77a Hispana Kongreso de Esperanto kaj 51a kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. En la momento redakti tiun ĉi bultenon, jam aliĝis pli ol 150 homoj, ĉu al unu, ĉu al la alia, aŭ plejmulte al ambaŭ. Ili venas el trideko da landoj, kelkaj tiom malproksimaj kiel Japanio, Mongolio, Armenio, Togolando aŭ Meksikio, por menciigi iujn. Vidu la liston ĉe: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/listo-de-aligintoj>

Ne prokrastu la aliĝon! Vidu la detalojn en la adreso: <http://www.esperanto.es/kongreso/>, kie ankaŭ estis publikigita la Mendilo por servoj de la kongreso (loĝado, ekskursoj, bankedo).

### **VIZITIS NIN**

Samideano Jeanik Marolleau, kiu instruas Esperanton de multaj jaroj en Angers, Francio, venis al Madrido kun sia universitata koruso kaj orkestro Vox Campus, por koncerto en la Universidad Autónoma, kaj profitis la okazon por renkontiĝi kun madridaj esperantistoj.

### **KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Notu la ceterajn renkontojn antaŭviditajn, en la unua sekcio de tiu ĉi informilo.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrid/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: <http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)